Johann Wolfgang von Goethe,

Limoj de l'homaro

tradukita de Alexander Taussig

Se la praega
Sankta la patro
.....
El nuboj rulsonaj
Sendas fulmbenojn
Super la teron,
Mi de l'vestaĵo
Lia la randon
Kisas timeme,
Fidon en brusto.

Ĉar kun la dioj
Sin ne komparu
Homa estaĵ'!
Se lia verto
Tuŝas la stelojn
Tiam nenie
Plandoj malcertaj
Povas sin kroĉi
Kaj kun li ludas
Nuboj kaj ventoj.

. . .

Se li kun ostoj
Firmaj, fortikaj
Staras sur tero
Daŭre fondita,
Li ne kapablas
Eĉ sin kompari
Nek kun la kverko
Nek kun la vito.

Kio distingas
Diojn de l'homoj?
Ke antaŭ tiuj
Migras ondaro,
Eterna torent':
Ondo nin levas,
Ond' nin englutas,
Ni alfundiĝas.

Rondo malvasta
Vivon limigas
Nian kaj multaj
Generacioj
Daŭre viciĝas
Al ĉeno senfina
De la ekzisto.

...

Traduko de la Germana poemo "Grenzen der Menschheit" de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Alexander Taussig *(∗1865-08-24).*

Arg-493-961 (2009-08-17 13:25:21)

Pri la tradukinto Alexander Taussig vidu la vikipedian retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Alexander_Taussig`*. Lia traduko troviĝas en* `www.literaturo.dk`*, en* `http://www.literaturo.dk/limoj.htm`*.*